

La 11-a Mediteranea Esperanto-Semajno en "Les Issambres"

4.3. - 11.3.2017

Post unu jaro ni denove renkontiĝis en suda Francio por kune ĝui agrablan semajnon ĉe la Mediteranea bordo. Partoprenis 101 geesperantistoj el 13 landoj. Alvenis reprezentantoj el Anglio, Belgio, Ĉeĥio, Finnlando, Germanio, Hispanio, Irlando, Italio, Litovio, Rusio, Svedio, Svislando kaj la plej multaj el Francio. La plej juna estis unujara knabineto *Rosaria*, filino de la geedza paro *Marek* kaj *Veronika* el Ĉeĥio. La eventon organizis *Christine Graissaguel* kaj *Monique Prezioso* kun helpo de aliaj esperantistoj. La programo ne estis streĉa, sed interesa. Temis ĉefe pri instruado, promenadoj kaj kulturaj vesperoj. Ankaŭ la hotelo proponis programon, kiun ni povis profiti.

Ni loĝis en belega feriejo *Vacancies* en la hotelo *Val d'Esquièr*, ĉirkaŭata de ampleksa trihektara parko por agrablaj promenadoj sub majestaj pinarboj. En la pasinteco ĝi estis palaco. La mirinda loko troviĝas inter la urboj *St. Raphaël* (15 km) kaj *St. Tropez* (24 km).

Sabate la 4-an de marto vespere ĉiuj alvenintoj kolektiĝis por preni aperitivan proponitan de la hotelo. La direktoro de la hotelo s-ro *Silvain Ceccoto* kun la urbestro de la komunumo s-ro *Jean-Paul Ollivier* bonvenigis nin. La dua invito al aperitivo okazis vendrede vespere. Manĝoj kiel kutime estis abundaj kaj bongustaj. Ne mankis variaj desertoj kaj glaciaĵoj, blanka kaj ruĝa vinoj.

Post la unua komuna vespermanĝo prezentiĝis la kursgvidantoj de la kursoj. Dum la semajno okazis kvar diversnivelaj E-kursoj. Verajn komencantojn iniciatis al Esperanto *Christine Graissaguel* el Francio. Iom pli progresemajn instruis *Nina Korĵenevskaja* el Rusio. *Marek Blahuš* el Ĉeĥio proponis kurson helpe de sia komputilo por emfazi rapidecon kaj solvi kelkajn malfacilaĵojn. *Dalia Pileckiene* el Litovio paroligis esperantistojn, dividitajn en kvin grupetoj, pri diversaj temoj pli malpli el psikologia vidpunkto.

La kursoj okazis antaŭtagmeze kaj posttagmeze antaŭ la vespermanĝo. Dum la paŭzo je la 10-a horo ni povis trinki teon aŭ kafon kun diversaj biskvitoj kaj ĉokolado. Dum la semajno funkciis ankaŭ libroservo. Ĉifoje oni vendis brokantaĵojn. En la hotelon venis vendistoj, kiuj ofertis diversajn artikolojn por aĉeti. En la ĵurnalo *Var-matin* aperis artikolo pri nia evento kun komuna foto.

Dimanĉe posttagmeze okazis festo en apuda urbeto *Roquebrune-sur-Argens*. Kelkaj el la partoprenantoj ĉeestis ĝin. Pro iom tro malvarma kaj venta vetero ĝi estis ne tiel impona kaj homamasa kiel pasintjare. Diversaj metiistoj prezentis ok kilogramajn ĉokoladajn tabulojn kun bildoj, kiuj estis poste aŭkciataj. Gesinjoroj *Gabalda* aĉetis unu "tabulon", dispecetigis ĝin kaj dum la kafo-paŭzoj ili regaladis kursanojn dum la tuta semajno.

Merkrede posttagmeze ni ekskursis al la proksima urbeto *Cogolin*, kies simbolo estas la koko. Ni rimarkis ĝin plurfoje dum la promeno kun loka ĉiĉeronino. Ŝi rakontis al ni ĝian historion. La urbo fieras pro sia horloĝturo. Ĉiujare en majo en la urbo okazadas la tradicia festo *Bravade de la St-Maur* (Bravaĵoj de la sankta Maŭro - patrono de Cogolin) por celebri la bataleman historion de la komunumo. La urbo estas ĉefe konata pro fabrikado de pipoj kaj pro manproduktado de tapiŝoj. En la malgranda familia entrepreno, kie estas produktataj pipoj finiĝis la ekskurso tra la urbo *Cogolin*. Revenvoje ni ankoraŭ haltis ĉe la haveno de *Port-Grimaud*. Ĉiutage post la tagmanĝo estis libera tempo por mallongaj promenadoj kaj ekskursoj en la ĉirkaŭaĵo.

Ĉiuvespere ni ĝuis diversajn kulturajn prezentadojn. La pentroarton de *Salvador Dalí* prezentis *Nina Korĵenevskaja* dimanĉe. *Raita Pyhälä* parolis pri Finnlando. *André Weber* bilde vizitigis al ni la urbon *Schwerin* en Germanio. *Marek Blahuš* skizis la historion de Ĉeĥio kaj parolis pri la universitata urbo Brno, kiu troviĝas en suda Moravio kaj kiu estas la dua plej granda urbo en Ĉeĥio. Proksime de Brno troviĝas la fame konata batalkampo *Austerlitz*. Ĉiujare en decembro sur la sama loko okazas spektaklo rememore al venko de Napoleono. *Dalia Pileckiene* prezentis la litovan lingvon, kiu ne similas al Esperanto, kiel iuj opiniis pro tio, ke Zamenhof loĝis ankaŭ en ŝia gepatra lando. Tre impresa kaj bone aranĝita estis la duhora bildprezento pri Vjetnamio de *Jean-François Cousineau*.

La lasta vespero, kiel kutime en ĉiuj E-aranĝoj konsistis el prezentadoj de ĉeestantoj. La kursanoj pretigis diversajn amuzajn skeĉojn, deklamon de poemo kaj estis sprite klarigitaj kelkaj konfuziloj. Ne mankis tombolo en kiu ĉiu gajnis ion. La vespero finiĝis per dankoj al la organizantoj kaj kursgvidantoj . Sekvis dancado akompane de akordiona muziko.